Joseph Campbell,

La maljuna virino

tradukita de Lajos Tarkony

Kiel blanka kandelo
antaŭ Sankta Virgin'
estas la vizaĝo
de maljuna virin'.

Kiel lasta radio
de l' sun' mortas for,
estas virino
kun finita labor'.

Kun pensoj serenaj,
post ĝoj' kaj esper'
ŝi milde memoras
pri pasinta sufer'.

Traduko de la Angla poemo "The Old Woman" de Joseph Campbell *(∗1904-03-26 – †1987-10-30) en Esperanton de* Lajos Tarkony *(civila nomo: Ludwig Totsche, ∗1902 – †1978-07-15).*

Arg-842-1696 (2013-02-26 19:14:43)

Li estis hungara esperantisto. La teksto aperis en 1953 en la revuo „La Praktiko", n-ro 3-4 (185-186), 17-a jarkolekto, marto-aprilo 1953. S-ro Lars Kromann aperigis ĝin en sia kolekto `http://www.literaturo.dk` *sub* `http://www.literaturo.dk/maljuna.htm`.
Tiu ĉi poem-traduko aperis en la revuo „Literatura Mondo" en la jaro 1947, en la numero 179. Vidu la kolekton `http://egalite.hu/vinye/literaturamondoenhavo.pdf` *, paĝo 61. (En http://www.literaturo.dk/maljuna.htm estas indikita la pseŭdonimo J. I. kiel tradukinto.) Pri Lajos Tárkony vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Lajos_TΓarkony`.